

Du salutoj al 1-a Internacia Lernejo nome de ILEI

**Saluto de *Magdaléna FEIFIČOVÁ (Fejfi)*, ILEI-vicsekretariino
al la 1-a Internacia Esperanto Lernejo
okazanta en Bartošovice (elp. Bartošovice), Ĉeĥio
ek de la 8-a ĝis la 11-a de novembro 2012**

la 1-a Internacia Esperanto-lernejo
1. medzinárodná škola esperanta
Bartošovice, Ĉeĥio, 2012-11-08/11



Karaj,

permesu al mi, ke mi salutu vin nome de ILEI – Internacia Ligo de Esperanto- Instruistoj, kiel ĝia vicsekretariino. ILEI ne nur kunigas instruistojn de Esperanto el ĉiuj anguloj de la mondo, sed ankaŭ eldonas por ili kaj por ĉiuj aliaj interesuloj la bultenon Internacia Pedagogia Revuo.

Ni tre ĝojas, ke al jam en niaj fratecaj landoj ekzistantaj E-lernejoj, kiel ekzemple SES – Somera Esperanto- Studado, kiu venontjare okazos en grava slovaka kultura centro Martin jam la sesan fojon, aŭ en via lando jam dum jardekoj okazantaj Somera E-Tendaro en Lančov aŭ Seminario de AEH – Asocio de Esperantistoj - Handikapuloj - en Skokovy aldoniĝas nova aranĝo, nome tiu ĉi Internacia Esperanto Lernejo.

Nia aranĝo okazas en Bartošovice, ĉarma moravia vilaĝeto kun forta fiŝtradicio, kie ni loĝas en belega kastelo – kaj mi konfesas, ke ĝuste tio estis la plej grava instigo por mia alveturo. Ni estas varme akceptataj en la loka bazlernejo, kiu estas admirinde bone ekipita per nova teknologio – multimedia interaga tabulo, kaj kies

lernantinoj ravis nin dum la unua vespero per kantoj kantitaj en senriproĉa Esperanto. Ni ĝojas havi en nia rondo eminentan instruiston, aŭtoron de furora lernolibro Esperanto *per rekta metodo*, kiu estas tradukita jam en 32 lingvojn el la tuta mondo. Ni ĝojas havi en nia rondo hungaran kantistinon Anjo Amika, kaj speciale ĝojigas min, ke ŝia koncerto estos ne nur por nia grupo, sed ke ankaŭ la lokanoj havos la eblecon sekvi ĝin.

En nia klaso renkontiĝis esperantistoj de diversaj niveloj. Kelkaj estas puraj komencantoj, kelkaj venis por plifirmigi siajn Esperanto-lingvo-konojn, kaj kelkaj, kiel ekzemple mi, por spioni la rektan instrumentodon de Stano. Eĉ unu lokulo trovis vojon en nian rondon, kio estas aparte ĝojiga.

Mi deziras al ni ĉiuj, ke la trideko de partoprenantaj lernemuloj en estonteco minimume dekobliĝu, ke la novuloj kaj lokuloj akiru bonajn impresojn pri nia verda lingvo, kaj ke ankaŭ el la Internacia E-lernejo fariĝu bela kaj bona tradicio.

Fine mi deziras danki al Pavol Kaščák (elparolu Kaščák), redaktoro de Verda Stacio, kaj lia helpanto Rostislav Čubok (elparolu Čubok) por ilia bonega ideo organizi ĉi aranĝon en tiel ĉarma loko kaj ĝenerale por la agrabla, familia surloka etoso.

Bartošovice, la 9-an de novembro 2012

Saluto de Stefan MACGILL Prezidanto de ILEI
al la 1-a Internacia Esperanto Lernejo
okazanta en Bartošovice (elp. Bartošovice), Ĉeĥio

Nome de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), mi ĝojas saluti kaj bondeziri al la Unua Internacia Esperanta Lernejo, okazanta ĝuste nun la 8an ĝis la 11a de novembro en Bartošovice, en Ĉeĥio. Tra la lastaj jaroj ni vidis multajn novajn projektojn, instrui nian lingvon en diversaj manieroj, en serio da novaj aranĝoj. Ni bonvenigas vian iniciaton inter tiuj, kaj bondeziras al ĝi longan estontecon. Nia revuo Internacia Pedagogia Revuo, ĝojos ricevi raporton pri la aranĝo, kiun ni povos ankaŭ afiŝigi en nia retejo. Ni deziras al la lernantoj instigajn sesiojn kaj rapidan progreson. Ni gratulas al la instruistoj, kaj invitas ilin aparte al nia sekva 46a Konferenco de ILEI, okazante proksime, en Herzberg-Sieber (Germanio) en la sekva julio.

Agrablajn kaj kontentigajn tagojn ni deziras al ĉiu!